

& Al la semanto:

< Rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 186 paŝoj dum 3 minutoj. Poemon verkis Antoni Grabowski (1912). Baladigis Martin Strid per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:31> (

a;do /(domi somi remi faami;mi remi fare fami doodo;do)×

(#Rekantaĵe: LaLado miso somi remi; fami reremi fami domi; TiTire dore doTi LaSo LaLa La)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 Feliĉa la semanto estas, ; Printempe kiu semis grenon ; Kaj en aŭtuno ĝoje festas ; De bonrikolto la solenon.

(×; **Do paŝu fiere en la ĉeno ; Manoj kune en firma teno ; Aŭdi rakonton de la klara voĉo jen.)**

'2 Feliĉa, kiu en la koro ; Pri granda verko flame revis, ; Kaj el la ĉarma revo-floro ; Maturan frukton elricevis.

'3 Arbeti kiun, Majstro kara, ; Vi plantis ĉe Vistul-rivero, ; Elkreskis ĝis lazuro klara, ; Etendas branĉojn ĉirkaŭ tero.

'4 Sub ĝi kolektis tero-filojn ; La jubile' de nova sento, ; Per kiu frate ligas milojn ; Neŭtrala lingva fundamento.

.....

'5 Krakovaj muroj ĝoje sonas, ; Dum lernantaro multnacia ; Dankeme sian Majstron kronas ; Per la verdaĵo laŭrfolia.

'6 En niaj koroj, granda homo, ; Stariĝas viaj monumentoj; La gloron de l' benata nomo ; Ripetos ĉiuj la jarcentoj!)